

Interlingvistikaj studoj en Poznan, Pollando

Aliĝu baldaŭ por la nova starto en septembro 2014!

Enprofundiĝi en literaturon, historion kaj movadon de esperanto, konatiĝi kun ĝia lingvistika priskribo, akiri larĝan bildon pri planlingvoj kaj interkultura komunikado.

Jen la konstanta oferto de la **Interlingvistikaj Studoj de la pola Universitato Adam Mickiewicz**, en Poznano.

Post plenumo de hejmtaskoj kaj ekzamenoj dum la 3-jara studado, fina ekzameno kaj defendo de diplomlaboraĵo la partoprenantoj akiras atestilon pri plenumitaj interlingvistikaj studoj de UAM. Tiu ĉi kompleksa formado – komparebla al filologiaj studoj kaze de aliaj lingvoj – estas unika.

En septembro 2014 startos nova grupo. Kandidatoj el la tuta mondo estas bonvenigataj.

Postulo: bona kono de E-o (min. nivelo B2) kaj baza kono de E-kulturo, baza diplomo pri superagradaj studoj.

Aliĝdato: 15.08.2014. Jam nun petu aliĝilon!

Studkotizo: A-landoj: 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), B-landoj: 700 PLN (ĉ. 175 EUR) / semestro. (ESF kutime disponigas kelkajn stipendiojn.)

Prof. Ilona KOUTNY, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj UAM, interlin@amu.edu.pl, <http://www.amu.edu.pl/~inter/>